UDK 001(05)=089.2
YU ISSN 0048-9557

# SCIENCA REVUO

Vol.28,n-ro 6(128)
31.12.1977.

Aperas 6-foje jare. Jarabono: 56 stelojn, 15 ned.guld., 6 us. dol., 100 jug.din.

ENHAVO:

*B.Popoviĉ:* Adiaŭaj vortoj de la ĉefredaktoro
*B.V.Tokarev:* Pri metodologio de la scienco
*T.Tyblewski:* Travivado de kontakto kun eksterlandanoj
*Baracho k. Posim:* Tabelo por la kalkulado de $MD_{95}$ en fungoj
*Cz.Biedulski:* Bioluminesko - ĉu rezulto de plasmaj procezoj...
*M.Ĝivoje:* Preparata bibliografio de vortaroj de...planlingvoj
EL SCIENCOJ - Generatoro de magiaj kvadratoj
Enhavtabelo de volumo 28

## ADIAŬAJ VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Kiam mi transprenis, en la jaro 1961., provizore redakti "Sciencan Revuon", mi neniel povis imagi ke "la provizoreco" daŭros 16 jarojn!

Sen redakta sperto, sen firma financa bazo, kun nur 200 abonadresoj - senditaj de la ekseldoninto (sen sendo de la mono!), kun tre malmultaj kunlaborantoj - mi kuraĝe eniris la laboron, por ke la revuo ne pereu, kun la espero ke baldaŭ troviĝos alia ĉefredaktoro kaj ke la anaro de ISAE liberigos la revuon de la financaj zorgoj.

Sed la espero kondukadis min ofte en la staton de malespero, Vivinte nur de la propra salajro, mi povis nur tre malofte kontribui finance al la revuo, sed mi faris kion mi povis: el la ŝparaĵo mi pruntedonadis la monon ĉiam kiam estis necese, klopodinte ke la revuo aperadu sen grandaj malfruoj. Krom tio la tuta laboro (redaktado, teknikaj aranĝoj, korespondado, kartoteko kun la eksped'listoj, eĉ preskaŭ la tuta ekspedado) kuŝis senpage sur miaj ŝultroj. Anstataŭ utiligi la propran energion por la scienca plifirmiĝo kaj socia pozicio (aŭ perlaboradi por piliuksa vivo!) mi konstante savadis la revuon, por ke ĝi ne malaperu.

Estis malmultaj membroj de ISAE kiuj la revuon subtenadis (finance kaj/aŭ morale) en la unuaj tagoj de ĝia vivo en Jugoslavio. Nur kiam estis klare ke ĝi ne pereos, ke male ĝi kreskis kaj komencis aperadi 6 foje jare, multaj helpis ĝin ankaŭ finance. La ŝuldo al mi, atinginta la pinton de 20000 steloj, komencis faladi kaj la abonantaro transsaltis la nombron 600.

En tia stato mi ŝatis liberiĝi de la eldona tasko, sed neniu bonvolis transpreni la eldonajn zorgojn (kvankam ili jam ne estis tiom grandaj kiom kelkajn jarojn pli frue). Devis bedaŭrinde veni la malagrablaĵoj por ke oni tranĉu la aferon. Pro la motivoj aperigitaj en la BULTENO 46 de ISAE, mi devis ĉesigi ĉiun kunlaboron kun UEA. Se en la estraro de unu organizaĵo, unu estrarano povas senpune kalumnii kaj nomi malhonesta homon kiu duonon de sia vivo oferis sindone al E-movado, en tiu organizaĵo io estas malsana. Mi fariĝis la viktimo de tiu malsano - mi devis flankeniĝi.

La eldonado de Scienca Revuo, bazita antaŭe je mia honesteco kaj sindonemo, ne povas plu resti en manoj de la homo sur kies honesteco restis nelavita la makulo farita senrespondece far estrarano de UEA. Malgraŭ ĝeneralaj deklaroj pri la honesteco, sen la publika malkaŝo de la plena vero, en la publiko restas ia malbona impreso, tra la koridoroj oni flustras malveraĵojn k.t.p. Tion oni sentas ankaŭ en la iometa nombrofalo de la abonantoj kaj en nekutima konduto de du-tri delegitoj de ISAE. Prof. C. Støp-Bowitz, samtempe vicprezidanto en UEA kaj ISAE, ne postulis energie ke oni nepre lavu la faritan makulon, sed agis tiudirekte tro milde. Ne sukcesinte per tia ago, li poste eĉ kulpigis min, deklarinte ke UEA faris sian devon! Krom tio li insistis ke ISAE restu nepre en UEA, kvazaŭ ISAE ne povus vivi sen UEA! Iuj estraranoj cedis lian minacon ke li forlasos siajn oficojn en ISAE se ISAE eksiĝus el UEA. Kaj ISAE povis montri la solidarecon kun sia prezidanto kaj eldoninto de la revuo nur per la minaco pri eksiĝo el UEA!

Kun tiaj sintenoj mi ne deziras disputi, sed lasi ĉion al la estonta evoluo. Mi adiaŭas Vin, la membrojn de ISAE (kaj abonantojn de Scienca Revuo) kun sento de doloro, sed aliflanke mi estas kontenta ke en preskaŭ ĉiu el viaj leteroj al mi troviĝas la dankesprimoj pri mia fervora agado por ISAE kaj SR.

Aliflanke mi estas feliĉa ke en tiel streĉa situacio troviĝis bona solvo por la plua eldonado de SR, en Ĉeĥoslovakio, tiel ke mia "flegita infano" ne sentos grandajn mankojn ĉe la komenco de sia nova vivperiodo, sen mia plua flegado.

Boĵ. Popoviĉ